FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Espérantistes de Normandie

- Nº 6I - -Janvier I962 -


Redaktas: Sro HANNIER,250,boul.Jean Jaurès-ROUEN



# L'ABSOLUTA ARMILO

Homoj,civilizataj (?),serĉas,kaj preskaŭ sukcesis inventi la absolutan armilon.

For la malpuraj bomboj ! La homaro baldaŭ disponos tutpurajn bombojn ! Tiaj bomboj destruos... nur la homojn,ne la materialojn,ne la fabrikejojn,ne la riĉaĵojn.Kia progreso !

Oni diras ke ŝirmilo povus protekti nin de stombomboj,se okazus tia milito.Sed,nur SE...se ni ne amase malhelpos ĝin.Ĉiu homo entenas,en siaj manoj,peceton da ilo detruonta.Ciu homo entenas,en sia koro,peceton da amo al l'homaro.Jes en la koro de ĉiu homo kuŝas la ABSOLUTA KONTRAŬ-ARMILO.

Car vi loĝas sur la alia flanko de la rivero,ĉar vi malsame opinias,ĉar via haŭto ne estas samkolora,mi devas mortigi vin.Tiel,tiu amiko,kun kiu vi konatiĝis dum internacia kongreso,kiun vi amas,eble, estos iam,pro ia ajn kialo,"oficiala" malamiko.Mi demandas : "CU VI MORTIGOS LIN ?"

Ke frenezaj homoj ne pripensis tion,tio povas esti.Ni,Esperantistoj,heredis de la Majstro la devon doni Pacon al la mondo.Sed, homo esperantista ne povas duoniĝi: la ĉiutaga kaj la kongresa homo estas UNU.Por Paco,CIAM DEJORAS Esperantisto !

Amiko,ne serĉu kial "via koro batas maltrankvile "! Car vi estas ĝiskore Esperantisto,vi scias ke via frato konas ĝojon kaj suferon kiel vi; vi scias ke miloj da homoj suferas ĝis morte pro malsato, vi scias ke pro tia aŭ tia kaŭzo (plej ofte,nenatura) naskiĝas miskompreno,kiu naskas bataladon aŭ militon,VI SEFERAS LA SUFERON DE LA MONDO.

Car ĉiu Esperantisto estas nature pacamanto,ni devas,senĉese, varbi adeptojn,por ke "falu,falu,la baroj inter la homoj,inter la koroj"! Sed,la Esperantistaro sola ne povos savi la mondon.Tial,kune kun tiuj kiuj havas saman pacan idealon (sam ide-an-aro) ni agos,nelaciĝante,ĝis kiam nia verda stelo lumigos mondon eterne pacan.

Cu tiu deziro ne taŭgas en Kristnaska semajno ?

Maurice HUET
Prez.de U.N.E.

# LA KAŬZOJ *de nia* ESPERO

Oni sin rememoras kiom da argumentoj,pli aŭ malpli validaj la inventintoj batalis;kiom ili klopodis por akceptigi la pravecon de siaj teorioj,aŭ la valoron de siaj elpensoj.

Sur la lingva tereno,la Esperantistoj renkontas la samajn malfacilaĵojn kiel ĉiuj pioniroj. Cu Esperanto estas nur provo inter aliaj provoj ??? Cu la Esperantistoj iluziĝas kredante la sukceson de sia idealo ???

Niaj argumentoj devas sin apogi ne nur sur raciaj atentoj, sed ankaŭ sur kontroleblaj faktoj. Ni estus utopiistoj,se ni rekomendegus nure Esperanton kiel interkomprenan rimedon ĉe la popoloj,opinian te ke ĝi estos sufiĉa por regigi la pacon sur nia planedo.

Esperanto estas la natura konkludo de la senĉesa evolucio sur la lingva tereno.Oni povas tute preterlasi ĝian artefaritan flankon ĉar ĝiaj radikoj estas elektataj en aliaj lingvoj pro ilia internacieco.Esperanto ne estis kreata por laŭdegi ties inicianton,L.L.ZAMENHOF,kies la tut-sindona vivo estis dediĉata al liaj samuloj.Esperanto ne estas spirita fantazio,sed kresdo bone staranta kiu trairis sian kreskan periodon, kaj fortigiĝis en la batalo.

Kiel Esperanto estas heredanto de la naciaj lingvoj,tiel la Esperantistoj estas la heredantoj de la diversaj popoloj.

(fino paĝo 7)

# Nia Vivo

BLANGY s/ BRESLE

Ges-oj POTTIER informis nin pri la naskiĝo de sia dua filo TIERI. Sro POTTIER, vicprez. de U.N.E senlace propagandas Esperanto'n en instrua-Fako.

LE HAVRE

La 7-an de ocktobro malfermiĝis la publikaj kursoj de Esperanto, en festĉambro François Ier. Tiuokaze, la Havra Grupo ekspoziciis esperantaĵojn. Malgraŭ la pluva vetero, kelkaj dekoj da personoj vizitis tiun ekspozicion. La tri lo kaj gazetoj rilatis pri la afero.

La elementaj kursoj funkcias ĉiusabate, je I7h30, salle François Ier.

-----

Lundo, la I3-an de Novembro, la grupo kunvenis en salonoj de "Marie de Graville" por akcepti junan polan esperantistinon, kiu ĵus venis de USONO, per la kurier-ŝipo "United States". F-ino FRODTMA parolis pri sia vojaĝo en Usono, pri sia lando kaj pri la Esperanta movado en Pollando. Por multaj, tiu renkonto ebligis paroli nian lingvon. La parolado kaj la postaj konversacio multe impresis la novajn gelernantojn, kiuj ne imagis ke oni povis, tiel facile, kaj flue, praktikadi Esperanton.

Tiaj renkontoj perfekte taŭgas por reviglig la dormeman grupon sed, bedaŭrinde, ili ne estas sufiĉe oftaj.

------

Catherine, filino de nia kasisto LESTERLIN, naskiĝis la I4 an de decembro. Ni gratulas la gepatroj kaj deziras al la bebo longan kaj feliĉan vivon !

DOMFRONT

Taŭga propagando de nia amiko VERON.

FECAMP

Vigla propagando de Sro PERmanne kaj Sro POTTIER (Patro)-Kursanino pretigas "Atesto pri Kapableco".

(fino paĝo 5)

# PHILATELIE

Une carte commémorative du super-paquebot "FRANCE " sera éditée le II janvier I962.

Elle sera affranchie avec le timbre spécial "FRANCE " de 0,30 NF et portera le cachet temporaire:

UNUA TAGO
Premier Jour
"ESPERANTO"

et, naturellement, l'Etoile verte.

Informez-en vos amis collectionneurs : le tirage est strictement limité. Ecrire à : M. HUET, 63, boulevard François Ier -LE HAVRE (Seine Mme).

Chaque carte : I NF (plus frais d'envoi sous enveloppe, après le II janvier ou franco pour oblitération et envoi direct du bureau temporaire) - On peut utiliser le CCP de M. HUET : ROUEN 732-83.

==================================

SURHAVU CIAM, CIE, SUR VIA BRUSTO, LA VERDAN STELON !

**POLICIERS**

**APPRENEZ L'ESPERANTO !**



« Ni komprenas nur, ĉu hungaran lingvon ĉu esperanton ? »

# FERVOJISTA ANGULO

Same kiel lastan jaron,tri kursoj malfermiĝis la fervojista medio Rouen-Sotteville.Unu por plenaĝuloj en la laborejo "Sotteville Buddicum",du en la metilernejo en "Quatre-Mares".

Bedaŭrinde,malpli sukcesaj estas tiuj kursoj;lastan jaron dudek junuloj studis ĝis la fino de la kurso,ili nun regule korespondas eksterlanden kaj kelkaj el ili,kiuj ne estas foririntaj en alian urbon pro ilia laboro,sekvas la perfektigan kurson.Sed,nur dek novaj junuloj,tiun jaron,komencis la studadon.Kial ? ni ne scias,sed verŝajne estas ĉar tiu "nova ondo" estas malpli...laborema.

Pli malpli vizitata la monata kunveno okazas ĉiun trian mardon en "konferenca ĉambro "en la laborejo de Sotteville Buddicum,tie la ĉeestantoj pritraktas la Esperantistajn Fervojistajn aferojn sed ankoraŭ diskutas pri la amikaj rilatoj kun la Ruenna grupo de U.E.N kaj kune kun ellaboras la Normandan Kongreson kiu devus antaŭenpreŝi ESPERANTON en nia regiono kiel raketo...

LOISEL

# COMMERCE & ESPERANTO

Un grand nombre de contacts avec les pays de l'Europe occidentale m'ont permis de constater la valeur pratique de UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO dans les grands domaines de l'activité humaine.Sans préjudice pour d'autres organisations internationales,qui ont leur place dans des milieux déterminés, on peut souligner le réseau INCOMPARABLE que représentent les délégués de "U.E.A." et la spontanéité avec laquelle ces"consuls" répondent aux demandes de renseignements (tourisme international,précisions d'ordre culturel,Marché commun...) On s'étonne alors que les Espérantistes n'aient pas adhéré en très grand nombre à U.E.A.qui,vis à vis des pouvoirs publics et des masses populaires,représente la Langue de Zamenhof?

Mon appel est purement personnel,il n'engage en rien le bureau de l'Union des Espérantistes de Normandie, c'est le délégué de U.E.A.que je suis, qui vous exhorte à combler cette lacune aujourd'hui même.

Nos mouvements régionaux catalysent des forces qui agissent en profondeur: mais la décision définitive viendra de la puissance de l'ESPERANTO sur le plan UNIVERSEL qui est son domaine propre.

Marcel BOSC.

---

VOTRE DEVOIR D'ESPERANTISTE EST D'ADHERER à

| | | Plus de 2Ians | Moins de 2I ans |
|---|---|---|---|
| I°) | Membre dé U.E.F. (cotis.U.E.A.comprise) | IO NF | 6 NF |
| 2°) | Membre Jarlibro (donnant droit à annuaire UEA,mais cotis.UEF non comprise) | IO NF | 5 NF |
| 3°) | Membre Abonanto (Jarlibro et revue"Esperanto) | 20 NF | IO NF |

UNION FRANCAISE pour l'ESPERANTO - 34,rue de Chabrol -PARIS (X)
C.C.P. PARIS 855-35

# Nia Vivo


(daŭrigo de p.3)

EVREUX

Kurso de Sro VILETTE. Sro COLLEU pretigas ampleksan propagandan semajnon,(grava ekspozicio publika,Priparolado de Sro BOSC : "Problème de la langue universelle".

CAEN

Post la somero ensomniĝo,la Caen'a grupo reprenis sian antaŭeniradon.




Unua kunveno okazis la 24 an de septembro,dum kiu ni planis nian venontan agadon.

Sekve de tio,post mallonga propagando,ĉu en la loka ĵurnalaro,ĉu per afiŝetoj algluitoj ĉe la montrofenestroj de simpatiemaj komercistoj, ni malfermis kurson por komencantoj : de post la 9 a de oktobro,ĝi estiĝas ĉiulunde,en "Office municipal de la jeunesse",kurso por progresantoj funkcias la samantagon : ambaŭ kursoj enkalkulas 20 gelernantojn.

La grupo eksperimentis ankaŭ rondiradon da libroj kiu kontentige disvolviĝas.

La kunvenoj regule okazadas ĉiumonate,la unuan dimanĉon,je la I0a en OMJ,ni kutimas ĝin daŭrigi per amika tagmanĝo,provo pleje ŝatata,preci pe de niaj eksterurbaj gesamideanoj.

LES ANDELYS

La loka Esperanto-klubo celebris la Zamenhof-tagon la I7-an de décembro posttagmeze en la ludiĉambro de la porknabina elementa lernejo. La junaj membroj de la progresiga kurso partoprenis konkurson kies temo estis : "La plej bela letero al la korespondanto ".Post longa diskutado, la juĝantaro elektis la leteron de Josette CARON,I2-jara,kiu gajnis kiel premion "Bildlibro pri Bestoj".

Estis prezentitaj tri kolorfilmoj pri Danlando,prunteprenitaj el la ambasadejo.

Ceestis proksimume 70 personoj,inter ili la prezidanto de la Norman da Esperanto Unuiĝo,la estro de la loka gimnazio kaj la estrino de la porknabina lernejo.

ELBEUF-CLEON

Le dimanche 3 décembre I96I sera pour la Groupe esperantiste de la Régie Renault de Cléon,une date memorable.

En effet,au cours de cette journée a eu lieu l'inauguration de la salle du Comité d'atablissement de l'usine,salle réservée aux "Activités culturelles " du personnel.

Notre groupe qui,depuis sa création voici un an,n'avait aucune salle peut disposer désormais pour ses cours et ses réunions d'un cadre agréable. C'est dans celui-ci que les espérantistes de la Régie ont organisé une exposition sur la langue universelle et sur la philatélie.

Sous la présidence de M.JARDON,Directeur de l'usine de Cléon et président du Comité d'Etablissement,cette inauguration a connu un très vif succès.

(fino pağo 6)

# 31e NORMANDA KONGRESO

sous la présidence d'honneur de M.TISSOT ,Maire de ROUEN

ROUEN- 5 et 6 mai 1962 -Grande salle des Fètes de l'Hotel de Ville-ROUEN

oooooooooooooooooooo

## COMITE D'ORGANISATION :

Président: M.JOUIS -Président du Groupe de ROUEN
Vice-Président: M.PARRINGTON
Secrétaire: M.HANNIER
250,boulevard Jean Jaurès à ROUEN
Trésorier : M.BUISSON
IO,rue François Blanchard à MAROMME(S.Mme)
Membres: MM. BOSC & LOISEL

Groupes associés : Sotteville et Elbeuf-Cléon

Voici d'ores et déjà quelques renseignements et recommandations :

- ADHESION : Individuelle : 4 NF - Autres membres de la mèmefamille:2 NF
Etudiants : 2 NF - Enfants de moins de I5 ans : gratuit.

- CHAMBRES D'HOTELS ) A l'étude,
- BANQUET ) tous détails figureront sur bulletin complet d'adhés.

- CARTE POSTALE ILLUSTREE & BUREAU TEMPORAIRE.

-Carte postale spécialement éditée et oblitération illustrée: I NF,franco pour oblitération et envoi direct -(ajouter timbre à 0,25 pour envoi sous enveloppe après le 6 mai I962).
-Les commandes sont reçues dès maintenant par le trésorier M.BUISSON ,IO,rue François Blanchard à MAROMME -CCP.Rouen III3-76 (compte-courant personnel)-Bien préciser l'objet du versement.

- RECEPTION DES INVITES ETRANGERS:

-Des Espérantistes hollandais,allemands,belges,bulgares,yougo-slaves,et anglais ont été invités à notre Congrès.Les samideanoj des agglomérationsrouennaise et elbeuvienne qui envisagent de reçevoir un ou plusieurs de ces étrangers amis,sont invités à se faire connaitre dès maintenant auprès de Sro LOISEL, I63,rue Léon Salva à Sotteville .Ils voudront bien préciser s'ils désirent reçevoir: une dame seule,un monsieur seul ou un couple et de quelle nationalité.Satisfaction sera donnée selon l'ordre des inscriptions et,bien entendu,en fonction du nombre des invités présents.

A T T E N T I O N !

-Les adhésions proprement dites au Congrès,les arrhes pour la réservation des chambres d'hotels,les inscriptions pour le banquet ne seront reçues par le Trésorier ,M.BUISSON,qu'à partir du Ier février I962 -Seules peuvent ètre commandées maintenant les cartes postales illustrées.

-Demandez le bulletin complet d'adhésion à compter du Ier fév.I962 au secrétaire du Congrès,Sro HANNIER.

## LA KAUZOJ DE NIA ESPERO

(fino de paĝo 2)

Kelkaj homoj estas venintaj al Esperanto por kolekti poŝtajn markojn aŭ kartojn, aŭ por kontentigi sian scivolon. Sed frue aŭ malfrue tiuj diletantoj komprenos la gravecon de la ilo kiun ili disponas. Iu ilo kiu ekstermas la land-limojn kaj permesas al Durand paroli kun Popof, Smith aŭ Fou-Yen !! Iu ilo kiu alkondikas ilin pripensi ke ne estas necese ke terglobo estu dividata en multaj ŝtatoj regataj per leĝoj pli aŭ malpli malsimilaj !! Iu ilo kiu alkondukas ilin koncepti mondon sen land-limoj !!

Pro tio ni povas kredi kaj esperi ...

Pro tio Esperanto estas sendube la morgaŭa kultura lingvo, kaj baldaŭ ĝi venkos.

H. ROUSSIER

## Nia Vivo

(fino de p.5)

Pour nous, Espérantistes, elle fut l'occasion de montrer aux personnes présentes, que l'Esperanto n'est pas une utopie. A l'aide de documents émanants de nombreux pays, nous avons montré que cette langue est vivante et pratiquée universellement. Mieux, elle fut parlée entre les divers espérantistes présents. Pour montrer notre idéal, nous avons voulu réunir débutants et chevronnés. Notre désir de regrouper quelques-uns de ceux qui, dans notre région, mettent le meilleur d'eux-mèmes au service de l'Esperanto, fut réaliséParmi ceux-ci étaient présents: M. HUET, président de l'Union Esperantiste de Normandie, M. BOSC, président honoraire, M. SAGET, pionnier de l'Esperanto, M. JOUIS, président du Groupe de Rouen, M. LOISEL, président du Groupe Cheminots de Sotteville, M. GENTIL, fervent esperantiste elbeuvien.

Je ne voudrais pas oublier nos espérantistes de Cléon qui, jeunes ou moins jeunes, étudient notre belle langue d'amitié et de compréhension. Qu'il me soit permis, dans ces dernières lignes, de les remerçier sincèrement pour le travail accompli et que mes voeux les meilleurs les accompagnent dans l'avenir.

G. CHAMARET

-ROUEN

Sro LOISEL, Préz. de Esp. Fervojistoj kaj Sro GUERRE prezentis pripa roladon kun lum-bildoj pri lia esperantlingva vojaĝo, la unua en Bulgarujon, la dua en Jugoslavujon.

## Dek Rouenanoj en Parizo

Tiu vojaĝo okazis la IO-an de decembro pro la Jara Generala Kunveno de la Franca Fervoja Esperanta Asocio (F.F.E.A.), kie niaj dek geko legoj riprezentis la Fervojan Grupon de Rouen-Sotteville.

Ĉe tiu kongreso ĉeetis multaj Parizanoj kaj provincanoj, sed ankaŭ kelkaj eksterlandaj delegitoj venintaj de Anglio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando; kaj ni havis la grandan plezuron vidi ĉe la honora tablo-S-ron inĝenioron MOLLION, prezidanto de la "Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles Cheminotes" ( F.I.S.A.I.C.).

En fakaj revuoj jam oni parolis pri la diversaj temoj pritraktitaj, do rn tiu bulteno mi nur deziras substreki la gravan partoprenon de niaj geamikoj; plurfoje LEPRETRE, LOISEL kaj ROUSSIER prenis la parolon en la diskutoj kaj kiam la prezidantino de F.F.E.A., F-ino LEMONNIER, rememoris la agadon de la Grupoj, tiu de Rouen-Sotteville estis forte aplaŭdata. Ankoraŭ mi devas noti la partoprenon de F-ino MORICEAU, grupanino komisiita por la kalkulado de la voĉdonoj. En la varma kaj gaja etoso de tiu kongreso, la Rouenanoj verkis bone por la honoro de nia urbo kaj por Esperanto.

H. ROUSSIER

# FRANCISKO LA ETA ŜAFISTO

(daŭrigo)

## SUR LA KAMPOJ

Nun,Francisko pasigas ĉiujn siajn tagojn sur la kampoj.Por li ne plu estas ĵaudoj,nek dimanĉoj,nek festotagoj.Ĉiuj tagoj estas similaj. Li foriras en la mateno,kiam la suno frontas super l'Argentière,kaj kiam la vilaĝo vekiĝas,bruplena.Li malfermas la pordon de la ŝafejo kaj elirigas la bestojn kriante:

-Truste !..Truste !.. Mani !.. Mani !..

La dusakon sur la dorso,la bastonon aŭ la vipon en la mano li puŝas siajn bestojn sur la strateton.La homoj,kiuj lin vidas iri malantaŭ sia ŝafaro,diras:

-Jen Francisko,kiu iras paŝti !..Li ne estas okjara,kaj li jam ŝparigas ŝafiston al sia patro !..

Mario atingas lin sur la vojeto.Kelkfoje ili iras al Côte Belle, aŭ al La Combe,aŭ al Chalou.Ili estas kontentaj.

## SENILUZIIGO

Francisko ne plu iros paŝti kun Mario.Li estas malbona;li ĝojas lin inciti.Li volas mordigi lin per Fidèle.

-Kss!..Kss!..Mordu lin !..

Aŭ li diras:

-HO ! mi vidas tie viron,kiu venas...Ha ! Kompatinda Francisko, estas la gardisto ! Li tuj venos protokoli )..

Se ŝafino flankeniras:

-Rapidu,Francisko,venigu ŝin !..

Kaj se Francisko ne iras:

-Mi deziras apartigi miajn ŝafojn de la viaj! Reprenu la viajn, iru paŝti sola,kien vi volos !..

Tial,ĉi-vespere,Francisko diris al sia patrino:

-Panjo,mi ne plu volas iri kun Mario:li turmentas min.

-Certe ! respondis la patrino;vi nun estas granda;vi bone forhavas lin !

## LA TERENO DE FRANCISKO

Kio surprizas Franciskon ne estas paŝti sola.Li nun konas ĉiujn "paquiers":li ŝatas Côte-Belle kaj ĝian malnovan lignodomon ĉe la arbarenirejo,kaj la lageton kie trinkas la ŝafinoj.En Chalou,estas rivereto,kiu rapide kuras sin ĵeti en la Durance.Sur deklivo,junaj arboj kreskas.En Chaumeyer,oni vidas lageton kun arboj.Sed la plej ŝatata loko de Francisko estas La Taro.

En la Taro ne estas damaĝoj,kaj la herbo abundas.La leporoj kuŝas en truoj kasŝitaj de la alta kerbo.Ofte,Francisko vidas kelkajn,kiuj forkuras laŭ la deklivo,kun levita vosto kaj mallevitaj oreloj.

Ha ! se li havus hundinon,kiel Diana,li kunportus hejmen,kio necesas por prepari bonan leporraguon !

(Tradukis el la franca : S-ino VINCENT -Les Andelys)

-daŭrigo kaj fino en la proksiman bultenon

A T T E N T I O N !!!

| I960 | I96I |
|---|---|
| | |

Si une croix figure dans le carré ci-dessous,cela signifie que vous ètes en retard d'une année dans le réglement de votre cotisation à U.E.N. (deux croix : deux ans) Adressez vite 2 NF par an à U.E.N. 63,boul. François Ier -LE HAVRE -- CCP.ROUEN 283-40